WIKIPEDIA

Tongana lingvo

La tongana lingvo parolata en Tongo estas unu el la polineziaj lingvoj, kiuj apartenas al la aŭstroneziaj lingvoj. Ĝi havas 100.000 parolantojn kaj estas VSO-lingvo.

La lingvo de Tongo nomiĝas angle "Tonga" aŭ "Tongan" kaj france "tongan". Oni aplikas la sufikson -an en Esperanto kaj nomas ĝin la tongana lingvo por tiel distingi ĝin de la tongaa lingvo kun ĉirkaŭ 200.000 parolantoj en Malavio kaj aliaj lingvoj nomitaj tonga lingvo.

ISO-lingvokodo :

639-1 =	to
639-3 =	**ton**

Situo ene de la polineziaj lingvoj

Inter la polineziaj lingvoj, la tongana aparte atentindas. Tongo situas en melanezia-polinezia lim-areo. Tial ĝi iom diferas de la aliaj polineziaj lingvoj kaj alproksimiĝas la fiĝian, precipe sone kaj sintakse.

Ankaŭ pro alia kialo gravas la tongana por la evolu-historio de polinezio. La tonganoj multe koloniigis la ĉirkaŭajn insulojn, kio klarigas la similecegon de la lingvoj de Tongo kaj Uveo (Valiso).

La tongana apartenas al la plej malnova evolu-tavolo de la polinezia. Apartena eco de la tongana estas la antaŭmetado de *h* en kelkaj vortoj, al kiuj mankas la analogiaj *s* aŭ *h*. Jen ekzemploj:

- supren
  - tongana: *hake*
  - uvea: *ake*
  - futuna: *ake*, *sake*
- malsupren
  - tongana: *hifo*
  - uvea: *ifo*
  - niua: *hifo*
- naŭ
  - tongana: *hiva*
  - uvea: *hiva*
  - futuna: *iva*
- kiom
  - tongana: *fiha*
  - niua: *fiha*
  - futuna: *fia*
- maro
  - tongana: *tahi*
  - uvea: *tai*
  - niua: *tahi*

- dormi
  - tonga: *mohe*
  - uvea: *moe*
  - niua: *mohe*
  - futuna: *moe*

La niua havas - kiel la tongana - la determinigan artikolon *he*, dum al la uvea, kiu vortare preskaŭ tute kongruas kun la tongana, mankas kaj ĉi-*h* kaj analogio por iu praa indonezia *h*. La uvea artikolo estas *te*. La samaj veras por la niua.

Lingvo-evoluo

Post la eltrovo en la jaro 1616 far la nederlandano *Jakob le Maire*, Tonga povis resti sendependa ĝis nun; nur inter 1900 kaj 1970 ĝi estis brita protektorato. Hodiaŭ Tongo regatas de konstitucia monarĥio simila al la brita.

Dum tiu tuta tempo la tonga kulturo povis teni sian identecon; la moderna lingvo kvankam fremd-influiĝis, ekzemple de la angla.

Ĉi-tio videblas ĉe mita teksto skribinta nelonge antaŭ:

Koe taimi nae ogomai ae fefine.
Tiutempe oni aŭdis pri ino. (*taimi* < angla *time* = "tempo")

Kompare kun pli malnovaj tekstoj ne nur ŝanĝiĝis iuj vortoj, sed la tongana alsimiliĝis al la angla lingvo ankaŭ laŭ aliaj aspektoj, ekzemple la ortografio. Vidu la jenaj ekzemploj:

La ido de kiu estas tiu knabino?
malnova: *coe tama ahái he fafine cóia?*
nova: *koe tama ´ahai fafine kóia?*

Estas la ido de Matapule Fotu.
malnova: *coe tana he mataboole co Fotoo*
nova: *koe tana ´ae matapule ko Fotu*

Ni iru al liku...
malnova+nova: *two alu fononga gi Licoo*

...por vidi sunsubiron.
malnova: *ger mamata he hifo he láa*
nova: *ae hilfo pe laa*

Ni aŭskultu la ĉirpadon de la birdoj...
malnova: *two fonogo gi he maboo he manoo*
nova: *kihe mapu ´ae manu*

... kaj la lamentadon de la kolomboj.
malnova: *me he tangi he loobe*
nova: *moe tagi `ae lupe*

La esperanta vorto "tabuo" venas el la tongana lingvo.

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Tongana_lingvo&oldid=5121404"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 14:22, 26 mar. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.